HEROLDO DE ESPERANTO

Eldono: *Flandra Esperanto-Instituto, P. v. Humbeekstr. 3, Brussel-West.*
Redakcio-Administracio: *T.Jung, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Ned.*
Heroldo aperis semajne antaŭ la milito ; ĝi reaperos semajne, kiam eble.
Jarabono 1946 : *por Belgujo 90 fk., Nederlando 5 gld., cetere 10 angl. ŝil.*
Anoncetoj : *20 komencitaj vortoj aŭ mallongigoj b. fk. 20.—, gld. 1.— ktp.*

DUONMONATA INTERNACIA ORGANO DE LA ESPERANTO-MOVADO

N-ro 7 (1056) — FONDITA EN 1920 — 22-a JARKOLEKTO — 1 Novembro 1946

Ĉu ni ĉiuj mortu pro nescio kiel vivi ?

Ni vivas en la plej bela momento, kian la homaro neniam antaŭe konis : en la momento, kiam ABUNDO eniras en la mondon.

Sed, ĉar ni rompas subite kun dekoj da jarcentoj, dum kiuj ĉia utilaĵo estis malabunda, tial ni estas kvazaŭ stulte konsternitaj kaj serĉas en la historio precedentojn kiuj ja ne ekzistas.

Ĉar teknikaj progresoj (maŝinaro, kemio) ebligas LIBERAN TEMPON samtempe kun abundo, ne estas juste, ke la homoj falu en mizeron pro manko de laboro.

Tial ke oni ne povas haltigi progreson, oni do devas tuj adaptiĝi al ĝi, ju pli frue des pli bone, ĉar la katastrofo okazos baldaŭ.

*

Tion skribis en 1934 Jacques Duboin, la fondinto de la Movado Franca de Abundo.

Intertempe « la katastrofo » jam okazis. Ĝi sukcesis, grandparte sed ankoraŭ ne tute ruinigi la homaran kulturon. Sed jam minacas nova katastrofo : la Atombomba Milito, kiu eventuale forviŝos la homaron for de la terglobo.

Jacques Duboin montras unu vojon por eviti tiun novan katastrofon, kaj francaj esperantistoj jam fondis ĉe la M.F.A. Esperantan sekcion.

Kiu deziras ekscii pli multe pri la Abundo-movado, tiu turnu sin por informoj al L. Pelletier, sekretario de « Esperanto-Abundo », 12 rue Haxo, Marseille.

VERDSTELAJ RADIOJ.

— En *Francujo* fondiĝis novaj Esperanto-grupoj en Fecamp, Pavillon-sous-Bois kaj Pontoise. Kursoj komenciĝis en Berre-l'Etang (por geknaboj), Le Havre (por skoltoj), Marseille (por membroj de Abundo-movado), Paris, Pavillon-sous-Bois kaj Saint-Denis (en infangardejo). Esperanto-budo troviĝis ĉe la Komerca Foiro de Lille en julio.

— En la progresema infanlernejo en *Bilthoven* (Nederlando), kie estas instruataj ankaŭ la nederlandaj principidinetoj (la filinoj de princino Juliana), post longa promilita stagnado nun rekomenciĝis la instruado de Esperanto, kiel fundamento por alilingva instruo.

— Pierre Petit, prezidanto de la asocio Unio Esperantista Franca, proponis, okaze de la 50-jara jubileo de tiu asocio en 1948 aranĝi kvintagan internacian konferencon en Parizo, sub titolo « *Esperanto, komuna lingvo de la Unuigitaj Nacioj* », kun kvar sekcioj : politika, ekonomia, scienca kaj intelekta. La sama proponas okazigi la Universalan Kongreson de Esperanto 1949 en Marseille.

— Niaj mortintoj : *William Bailey,* LK-ano, mortis la 5.8. en Dyserth (Kimrujo) ; *Sigfrid Feith,* aŭstra rifuĝinto, mortis en Argentino ; *Francisco Gonzalez,* kunfondinto de la Esp.-klubo de Buenos Aires, forpasis la 7.6. ; *R.C. Klavehn,* membro de BEA en Kilmarnock (Skotlando) ; *Manoog Marootian,* naskita en Turkujo, eksdelegito en Long Island City (Usono) ; *Carl Walter,* Berlin, aŭtoro de « Gaja Lernolibro » kaj de diversaj distraj broŝuroj, mortis jam dum decembro 1945 pro pulminflamo ; *Olof Sandberg,* prezidanto de la Esp.-klubo Landskrona (Svedujo). Mortis la francaj samideanoj : s-roj *Lefevre-Néret* en St.-Gilles, *Paparel* en *Fontenay-sous-Bois* kaj *Delavigne* en Amiens.

La antaŭkondiĉo

Ĉiam post milito la ŝtatviroj kunvenas por rearanĝi la difektitan mondon. Ĉiufoje la problemo estas, sanigi la vundojn batitajn de la milito kaj laŭeble eviti similan katastrofon en estonteco.

Eviti similan katastrofon en estonteco ! Kiom da planoj estis jam faritaj tiucele, post la diversaj militoj, kiom da papero surskribita kaj surpresita, kiom da inko kaj farbo foruzitaj !

Sed la plej bonaj planoj devas resti senfruktaj, la plej grandaj klopodoj devas resti senefikaj, dum oni restas malatentanta la ĉefan antaŭkondiĉon por daŭra paco, sen kiu nenia plano, eĉ plej promesplena kaj plej genie elpensita, kaj neniaj klodopoj povas daŭre sukcesi.

Tiu antaŭkondiĉo estas : *ke la homoj kaj popoloj de diversaj regionoj, rasoj, koloroj, kulturoj, civilizoj, dialektoj kaj lingvoj povu rekte, senpere interkompreniĝi, per unu komuna helplingvo apud la diversaj lingvoj gepatraj.*

Al ni, esperantistoj, tiu ĉi vero estas tute klara. Ĝin ni ekkonis jam delonge, por la pli multaj el ni ĝi estis la ĉefa instigilo al tio ke ni lernis Esperanton kaj aliĝis al la movado. Sed al la cetera mondo tiu vero ne estas tiel klara kaj evidenta. Dum la milito, efektive, oni povis kaj nun ankoraŭ oni povas renkonti grandetan nombron da homoj kiuj jes ekkonis ĝin — homoj simplaj kaj altranguloj, armeanoj kaj civiluloj. Sed la ekkono de la vero ankoraŭ ne estas ĝenerala ; cetere multaj, kiuj ĝin jam ekkonis, ree forgesos ĝin en la paso de l' monatoj kaj jaroj, nun kiam denove estas paco, kiam la danĝero ne plu, aŭ ankoraŭ ne denove, estas akuta.

Estas nia tasko zorgi ke la ekkono pri la neceseco de komuna helplingvo ne estingiĝu. Ni devas ĉiam denove prediki tiun ĉi veron, ĉiam denove atentigi pri ĝi, se necese puŝi la homojn per la nazo sur ĝin, enmarteli ĝin en la cerbojn kaj korojn : ke neniam ekzistos daŭra paco, se ne antaŭe al la homaro estos donita la rimedo por rekta, senpera interrilatado, kun la plej malgranda ŝanco de miskompreno, tra la tuta mondo.

Ni ne rakontu ke Esperanto per si mem, per ia mistera miraklo, kreos la pacon surtere. Tion ni mem ne kredas. Sed por atingi daŭran pacon, ĝi estas nepra *antaŭkondiĉo.*

Ĝin ni diru per ĉiuj al ni disponeblaj rimedoj kaj manieroj : per niaj propraj buŝo kaj plumo, per la gazetaro, per radio ; ĝin ni diru al niaj parencoj kaj amikoj, al niaj kamaradoj kaj kolegoj, al niaj klientoj kaj liverantoj, al niaj super- kaj subuloj, eĉ al personoj tute fremdaj aŭ hazarde renkontitaj. Kaj ĝin ni diru ne nur mallaŭte, flustre, timeme aŭ hezite; ĝin ni nun rajtas jam diri kun plena aŭtoritateco, laŭte kaj kuraĝe, senhezite kaj firme. La rajtigilon por tion fari ni ricevis — de kiu ? Sonas paradokse : ĝin ni ricevis de niaj plej grandaj malamikoj — la nacisocialistoj ! Ili donis al ni la ateston ke nia afero estas taŭga kaj valora, ke en ĝi estas kaŝita granda, mistera forto. Ili donis al ni tiun ateston oficiale kaj konvinke, per la fakto, nome, ke ili malpermesis niajn organizojn kaj gazetojn, konfiskis bibliotekojn, persekutis la lingvon kaj ĝiajn adeptojn. Kun tiu argumento en la mano ni estas hodiaŭ centoble pli bone ekipitaj ol iam en pli fruaj jardekoj.

Tiu ĉi argumento estas ne nur bonega sed eĉ nerefutebla. Nacisocialismo volis *eviti* la pacon. Kvankam en la komenco de sia regado ĝi ŝajnigis pacemon, por ĝi estis milito la normala kondiĉo, sen kiu ĝi ne povus ekzistadi daŭre. Ĝi bezonis la draksemadon de l' milito por prosperi, por manteni sian povon kaj teroron. Ne devis esti ke interkompreniĝu la popoloj. Estis necese malhelpi ke ili fariĝu komunaj posedantoj de rimedo kiu la interkompreniĝon ebligus. Sekve Nacisocialismo ne povis ne persekuti nin. Sed la plej granda parto de la homaro en la profundo de sia koro *arde sopiras* la pacon. Universala helplingvo estas la ĉefa antaŭkondiĉo por daŭra paco. Do, antaŭen !

TEO JUNG.

Stando en la Internacia Foiro de Flandrujo en Gent

estis aranĝita de la grupoj « Amika Rondo » kaj « Laborista Esperantisto ». Pro tio, ke la Organiza Komitato de la Foiro senpage disponigis la standon nur du semajnojn antaŭ la malfermo, oni devis fari grandan fortostreĉon. Sed la penoj estas en neatendita grado rekompencitaj per la brila sukceso rikoltita.

La publiko kun miro konstatadis, ke Esperanto ekzistas ankoraŭ kaj, dank' al la lerta aranĝo kaj nelaciĝema informado, en kiu preskaŭ ĉiuj anoj laŭpove partoprenis, ĝi forlasis la standon kun impreso, kiun plej bone karakterizas la ofte aŭdita diro : « Ĉu Esperanto tamen sukcesos ? » Sed ankaŭ multaj ne plu aktivaj esperantistoj ricevis puŝon por revigligo. Krom multaj belgaj, vizitis la standon sudafrika, svisa, angla kaj nederlandaj samideanoj.

La propaganda valoro de tia elmontrado kompreneble ne estas facile taksebla. Vendiĝis 77 lernolibroj, 33 poŝvortaroj, 450 propagandaj broŝuroj. Disdoniĝis 7000 flugfolioj. Kolektiĝis longa listo da interesuloj por kurso kaj subskriboj por IEL. Envere ni eĉ ne revis pri tia interesiĝo.

Inter la plej fervoraj aranĝintoj ni menciu s-ron Vanneste, kiu cetere donis la ideon, s-rojn Lampe, Baetele, Leon De Bruyne, Gorreman kaj niajn du junajn amikojn J. Hollanders kaj G. Covent. Ĉi tie ni devas danki la afablecon de la firmo *Braun Fortuna,* meblofabriko, Coupure 180 bis, Gent, kiu senpage disponigis al ni la necesajn meblojn.

*

Sekvante la iniciaton de s-ro Lampe, s-ro Vanneste ankaŭ aranĝis *Esperantan montrofenestron* originale konceptitan, okaze de la « najbarfesto » de lia strato. Ĝi altiris la atenton de multaj Gentanoj kaj multe kontribuis al la sukceso de nia verda monato.

« Trans World Airline » uzas Esperanton por sia reklamo.

« Life International » estas la titolo de nova, dusemajna revuo ilustrita, eldonata de la konata firmo Time Inc., 330 East 22nd Street, Chicago 16, Usono. La 2-a numero (5.8.1946) enhavas sur la dua kovrila paĝo tutpaĝan reklamon de *Trans World Airline* (T.W.A.) en naŭ lingvoj, kies unua estas Esperanto *(It 's « Trans-Monda Aerlinio » in Esperanto).* La aliaj lingvoj estas la franca, araba, hispana, persa, portugala, greka, itala kaj ĉina.

Homo krevigas kadron de l' Tempo sed lingvobarojn rezignacie akceptas.

Uranio, la plej peza elemento kies nukleo (kerno) konsistas el pli ol 200 partikloj (protonoj kaj neŭtronoj), bezonas pli ol kvin miliardojn da jaroj por neniiĝi per memradiado. Tiu ĉi procedo kondensiĝas ĉe eksplodo de atombombo je ono de sekundo — pro tio ĝia terura detrua efiko kaj la nekredebla varmego (proksimume suna temperaturo) ĉe la eksplodo. La neŭtronoj, kiuj okaze de la eksplodo de atombombo forfendiĝas de la urania nukleo, estas neimageble « mikraj » (malgrandegaj). Se oni imagus atomon tiom grandigita ke ĝia diametro estus unu kilometro, tiam unu el ĝiaj neŭtronoj prezentus sin al la okulo kiel objekto kun diametro de nur unu centimetro. Por komparo ni memorigu, ke unu gramo da hidrogeno enhavas kvanton da atomoj esprimeblan per la cifero 6 kun 23 nuloj !

Homo krevigas la kadron de l' Tempo, sed la lingvajn barojn li akceptas rezignacie kiel neŝanĝeblan maloportunaĵon. Ĝis kiam ankoraŭ ? Kelkfoje povas efektive ŝajni, ke nia tuta klopodado estas vana, ke nia duonjarcenta propagando estis nur kriado en la dezerto. Tamen, la estonta feliĉo kaj bonfarto de l' homaro postulas ke ni daŭrigu niajn klopodojn, ĝis la mondo, por sia propra profito, kapitulacos antaŭ ni.

TAKH.

Kursanoj donacis Esperanto-librojn al urba biblioteko.

Fine de julio okazis en la nordbohema urbeto Doksy (Ĉeĥoslovakio) elementa, progresiga kaj instruista Esperanto-kursoj, ĉeestataj de 83 personoj. Preskaŭ ĉiu kursano donacis unu aŭ plurajn librojn al la urba biblioteko. La urbestraro disponigis al la Esperanto-movado domon, kiu antaŭe estis hotelo. Oni renovigos tiun domon kaj intencas doni al ĝi poste la nomon *Hotel Esperanto.*

Ĉu Eŭropa Unio ?

Churchill denove pledis en Zürich favore al Unuigitaj Ŝatoj Eŭropaj sed ... forgesis (kiel povas esti ?) la plej gravan paragrafon !

Amasoj da torturitaj, malsataj, senordaj homoj, ĉe la ruinoj de siaj urboj kaj loĝejoj, fiksobservas la horizonton, timante la alproksimiĝon de novaj katastrofoj, tiranio kaj terorego. Milioncentoj povus ĝui simplajn ĝojon kaj esperon, kiuj faras la vivon vivinda. La rimedo kontraŭ la malbonoj, pro kiuj Eŭropo suferegas, estas : unuigi la ŝtatojn de Eŭropo ! Ĉar, se oni ne aplikos la rimedon, ĉiam potencos en Eŭropo « BABILONA KAOSO » ! ! !

? ? ? Ĉu la Eminenta Moŝto efektive kredas ke « unueco » venos sen reciproka komprenado ? En Eŭropo oni uzas kvardekon da lingvoj diversaj. Babilona kaoso ? Certe jes. Eĉ kaosego ! Imagu Eminenta Moŝto, ke ĉiuj viaj parencoj kaj amikoj parolus alilingve ! Kion vi farus unuakondiĉe ? Sendube, vi proponus al ili unu solan komprenigilon, por ke ili povu KOMPRENE KUNSENTI siajn neniam malaperantajn diversideojn. Ĉar, aliokaze, la kaoso lingva restus. Nu, kial esperi, ke la eŭropaj ŝtatoj interkonsentos, interparolante senkomprene kvardek lingvojn ?

Ni, Esperantistoj, persistas pri nia devizo : « Neniam unueco sen unulingveco ! »

URTIKO.

Ĉarmo reciproke sin komprenigi per gestoj...

Juna nederlanda samideano faris al si la penon traduki el « Amerika Esperantisto » artikolon pri Skoltismo kaj Esperanto kaj sendis ĝin al la ĉefkvartiro de la nederlanda skoltaro. La respondo ne estas tre esperiga. En ĝi oni legas interalie : « La kontaktpunktoj por reciproka amikeco inter la knaboj de la diversaj landoj estas la ekzercado de la samaj agadoj, kaj evidentiĝas ke ĉe la ĵamboreoj la malfacilaĵoj sur lingva kampo ne estas tiel grandaj. (? ? Red.) Male, troviĝas por la knaboj eĉ certa ĉarmo en tio, reciproke sin komprenigi per gestoj kaj per kelkaj vortoj. (! ! ? ? Red.) Tio ne signifas ke la ĉefkvartiro staras rifuze kontraŭ Esperanto, sed jes ke ĝi konsideras Esperanton kiel personan amuzaĵon (« hobby ») por la individuaj knaboj, kaj ke ĝi estas volema kuraĝigi ĝin kiel tian. »

Lordo Robert Baden-Powell tamen rekomendis la studadon de Esperanto al la skoltoj, kaj ankaŭ Lady Baden-Powell, la ĉefskoltino de la mondo, havas pri Esperanto pli pozitivan opinion.

La movado en Ĉinujo ne haltis.

Sveda leganto sendis al ni la jenajn informojn, kiujn li ricevis de ĉina amiko, poŝtoficisto en Ĉengtu :

Dum la milito ni sekĉese disvastigis nian lingvon en diversaj lokoj. Aperis sep specoj de Esperanto-gazetoj, i.a. « Heroldo de Ĉinio », « Voĉoj el Oriento ». En Ĉunking estis fondita Ĉina Esperanto-Ligo, kiu nun transloĝiĝis al Ŝanghajo, kaj en nia urbo Ĉengtua Esperanto-Ligo. (Ĉengtu estas la ĉefurbo de la provinco Szechwan en okcidenta Ĉinujo kaj havas iom pli ol 700.000 loĝantojn.) Pasintan jaron ni aranĝis dufoje Esperanto-ekspozicion (en Ĉengtu), kaj ĉi-jare dum kvin tagoj (13-17 julio) novan ekspozicion, dum kiu aperis en kelkaj ĵurnaloj pli ol dek artikoloj pri Esperanto kaj nia movado. Nun ni havas elementan kurson kun pli ol 30 lernantoj, krom kursoj por progresantoj.

Kion skribis al ni niaj legantoj.

Kion skribis al ni niaj legantoj ? Estas ne malmulte. Ĉiumatene la spaco malantaŭ nia dompordo aspektas kiel batalkampo, la planko prisemita de leteroj, poŝtkartoj kaj presaĵoj. Legantoj ekster Nederlando tion eble ne bone komprenas. Ĉu ni do ne havas leterkeston ? Efektive ne. En nederlandaj loĝejoj kutime troviĝas nur fendo en la muro apud la dompordo, la leterportisto traŝovas la poŝtaĵojn, kaj ili gaje laŭplaĉe kirlas tra la aero kaj disvastiĝas ĉiudirekten sur la planko. Kaj se ni speciale farigus por ni leterkeston, ĝi devus ja esti tre granda, alie ĝi estus tuj plenŝtopita.

Preskaŭ ĉiuj niaj legantoj skribas tre afable, aŭ bonhumore. Plej ofte ili laŭdas kaj gratulas. Foje ili havas demandojn, dezirojn aŭ petojn. Foje ili donas valorajn konsilojn aŭ instigojn.

Foje ili kritikas, ĝentile kaj bonvole. Estas plezuro havi tian bonvolan legantaron kaj korespondantaron.

Iuj leteroj estas tre amuzaj, kaj ili igas nin elkore ridi. Tiajn leterojn oni ne povus pagi per oro, ĉar « rido sanigas » kaj bona sano oron valoras.

Sinjoro, kio okazis en via intelekto?

Unu tia amuza letero venis de iu vasko (basko) loĝanta en Meksiko. Li riproĉas al ni ke Heroldo ne estas plu tiel neŭtrala kiel antaŭ la milito. Prave : la fakto, ke provizore ĝi ne estas « oficiala » organo de difinita organizo, permesis al ni forĵeti la ioman (eble troan) « senkolorecon » antaŭmilitan, kaj ni sentas nin ne malfeliĉe ĉe tio. Li riproĉas ke ni aprobe raportis pri la propono de Bevin, li asertas ke nia « vidpunkto nova en la Esperanta movado estas ja SAT-aneca, tial ke Dio mem absolute ne volas, ke liaj kreitaĵoj vivu pace kaj bonstate. Ili male devas havi surtere suferplenan vivon, por akiri la rajton eniri la ĉielon postmorte », kaj li demandas al nia redaktoro : « Sinjoro, kio okazis en via intelekto ? » La skribinto, laŭ sia aserto, « laŭpove agitas, por ke mia patrio, kiu estas subpremata de Francio kaj Hispanio, akiru sian sendependecon, sian suverenecon. Se finfine okazos la liberiĝo de mia lando kara, tiam mi eble povos ĉi tie akiri la postenon de vaska ambasadoro, aŭ de ataŝeo. Mi eĉ kontentiĝus per tiu de konsulo ... Estas ja dezirinde, ke ekzistu kiom eble plej da nacioj, por ke estu multege da sinekuroj, kio kaŭzas, ke la simpla popolo devas ŝvite laboregadi. » Nia vaska samideano, se lia letero estus celita serioza, devus vivi ankoraŭ en la 15-a jarcento. Sed ni ja komprenas humoron.

Parenteze : « Flandra Katoliko », cetere tre laŭdante nian laboron, riproĉas al ni « ne-neŭtralecon » pro tio ke ni publikigis artikolon pri mahometanismo (« Esperanto por Islamanoj ! » en n-ro 3). Neŭtraleco ne signifas absolutan silentadon pri ĉiuj aferoj, kiuj povus iel ial iam malplaĉi al iu aŭ alia leganto. Neŭtraleco estas ankaŭ, se oni donas al iu kaj al alia saman eblecon por esprimi sian vidpunkton. Sed — ni jam ne pretendas absolutan neŭtralecon.

Radio ankaŭ ŝanĝu la signalojn !

Unu legantino demandis, el kiu poemo ni ĉerpis la vortojn publikigitajn ĉefloke de la 3-a numero, kaj ĉu ni ne povos publikigi la tutan poemon. Nu, tiu poemo aperis sub la titolo « Bremsŝtipojn for ! » en « Esperanto Internacia », julio 1945. (Ĉu vi ankoraŭ ne estas membro de IEL ?) Ĝia aŭtoro estas certa Teo Jung. Ĉu represi ĝin ? Redakcioj ne tre ŝatas represi. Tamen eble, en iu sekvonta numero, troviĝos loko.

Oooo ! OLINGO, la nova Esperanto!

Tion komunikis al ni samideanino en Usono : La fakto estis ke dum la UNO-Konferenco en San Francisko iu diris al mi : « Hieraŭ mi renkontis sinjoron kiu inventis novan lingvon, kiun oni povas lerni en duona horo ! » — « Ho, » mi respondis, « se temas pri la 16 Esperanto-reguloj, vi povas lerni ilin en 20 minutoj. Sed neniam tutan lingvon, vortaron, praktikon, literaturon ktp. »

Ŝi invitis la inventinton, kaj li almarŝis kun ampleksa materialo, libroj (cetere tre bone presitaj kaj binditaj), tradukoj ktp. : Li nomis la projekton *Olingo :* « Oooo ! » Kaj li montris la novan lingvon al mi, kaj mi diris : « Oooo ! » kaj ne fermis mian buŝon dum dek minutoj. Ĉar tiu nova lingvo, tiu « perfa » lingvo, estis io tute nova : estis Esperanto, — la absolute ŝtelita, iom frizita kaj komplikigita Esperanto — oooo! — 17 reguloj, preskaŭ la sama vortaro, kelkaj ŝanĝoj — jen nova lingvo.

Olingo, la kioma post Esperanto ?

Kiu sekvos, por pligrandigi la gloron de l' ununura mondlingvo kiu sukcesis ? Oooo!

Ĉu Stalin estis esperantisto ?

Unu leganto skribis, *antaŭ* la apero de la 5-a numero : « Forigu el via redaktado de Heroldo tendencon senkulpigadi germanojn. Kian sencon havas enmeti en la unuan numeron de Heroldo stultan anekdoton pri Stalin, ke li estis enkarcerigita kiel kapo de rabistoj, kaj en la duan numeron prikanton de Thomas Mann de germano fuĝinta Londonon ? »

La anekdoto pri Stalin evidente ne estas stulta eltrovaĵo sed fakto, intertempe konfirmita de diversaj flankoj. (Vidu en n-ro 3; plian konfirmon ni ricevis el Britujo.) Ni publikigis ĝin por ekscii, ĉu estas vero, ke li lernis Esperanton, aŭ ne. Cetere, ne ĉiam estas malhonore esti sidinta en malliberejo. Thomas Mann estas mondfama germana verkisto kiu, mem rifuĝinte al Usono, dum la milito ofte direktis admonojn al la germana popolo, pere de la *usona* kaj *brita* radioj ; kaj la « germano fuĝinta Londonon » estas nia *juda* samideano A. Mildwurf, kiu sukcesis sin savi el la Nazi-infero, dum liaj plej proksimaj parencoj estas murditaj.

Ni ne bone komprenas, kiel en la publikigo de artikolo de judo pri kontraŭnaziista Thomas Mann kaj en la publikigo de artikoleto pri la esperantisteco de Stalin povis esti kaŝita tendenco senkulpigadi germanojn. Tamen, kial oni ne povus pritrakti ankaŭ tiun temon ?

Abstinencularo.

S-ano Ben Dudink, IJsbaan, en Zaandijk, Nederlando, petas nin direkti alvokon al la tutmonda geabstinencularo, por reaktiviĝo kaj restarigo de kontaktoj. Interesuloj skribu al la nomita samideano.

Bellamy.

Alian alvokon ni ricevis de s-ro Jac. v. Wijngaarden, sekr.-kas. de « Internacia Asocio Bellamy », Torenstr. 26, en Beverwijk, Nederlando, por ricevi adresojn de esperantistoj en la tuta mondo, kiuj interesiĝas pri la ideoj de la konata usona verkisto kaj reformisto Edward Bellamy, kies plej fama libro « Looking backward » (Rigardante malantaŭen) vekis grandan intereson ankaŭ en la Esperanto-traduko (dua eldono nun estas preparata).

Vortoj de Lanti.

La libro « Vortoj de Lanti » *ne* estas libro de politiko, skribas al ni s-ano José Serrano, kaj li petas nin korekti la aserton aperintan en n-ro 2 : « Persone mi konas s-anon Lanti, kaj mi scias ke li abomenas politikon ... Jenan kvalifikon mi sugestas al vi : *eduk-socifilozofia verko.* »

La ĉenleteroj.

Jam rekomenciĝas tiu sensencaĵo : la ĉenleteroj, kaj ni povis konstati ke eĉ konataj esperantistoj ĝin partoprenas. Ni povas certigi al vi ke, ĉe nia redakcio, *ĉiu tia letero* tuj trovas sian vojon *en la paperkorbon,* eĉ se la sendinto pretendas ke la ĉeno estas komencita *por la propagando.* Se ĉiuj samideanoj agus same, tiu sensencaĵo, almenaŭ inter esperantistoj, baldaŭ estus likvidita.

*

Kaj per tio ni finas hodiaŭ, atendante la komunikojn, dezirojn kaj kritikojn ankaŭ de aliaj gelegantoj.

Esperanto estas varma, amika lingvo.

« Mi tuj sentis ke Esperanto estas varma, amika lingvo, kaj tiu ĉi unua ardo neniam perdiĝis al mi, » skribis novzelandano *V. J. Leck* en Wellingtona tagĵurnalo « The Southern Cross », en kiu li raportas i.a. pri sia unua renkonto kun egipta esperantisto. « Vortoj ne povas esprimi la plezuron kiun mi havis, alveninte en Port Said, kie mi estis akceptata de Esperanto-delegito, kaj konstatante ke mi kapablis konversacii kun li, kvankam li ne komprenis angle. Li estis egipto kaj estis lerninta Esperanton en Port Said. » Pli poste, en Eŭropo, s-ro Leck eltrovis ke ne ekzistas lingva baro por li, ĉar ĉie li renkontis esperantistojn, kiuj akceptis lin ne kiel fremdulon sed kiel amikon.

Esperanto kaj Filatelo.

La Pariza filatelista gazeto « Le Timbre » deziras uzi Esperanton informcele. Seriozaj filatelistoj helpu nin. Ni nun atingas iom post iom interesajn sukcesojn en medio de Pariza filatelistaro, sed nia antaŭenirado estos ebla nur dank' al la helpo de ĉiuj. Se vi scipovas la francan, petu esperantlingve provekzempleron de tiu gazeto senpage rekte de « Le Timbre », 5 rue Lamartine, *Paris 9,* Francujo. Filatelistoj esperantistaj helpu la Internacian Filatelan Esperanto-Klubon per sia aniĝo, per informado, kaj petu informojn de « La Interligilo », 46, rue Lamartine, *Paris 9,* Francujo.

Movado de Abundo.

Dum la daŭro de la Internacia Ekspozicio en Marsejlo la Movado Franca de Abundo propagandis Esperanton per granda anonco (afiŝo ?), aranĝita de la Esperanto-sekcio de tiu movado. La ekspozicio daŭris de 16 ĝis 30 septembro.

Dimanĉon, la 29-an de septembro, okazis en Marsejlo granda kunveno por akcepti kaj aŭskulti s-ron *Jaques Duboin* el Parizo, ekonomiiston, fondinton de la Movado Franca de Abundo. Inĝ. Alfred Doerr, prezidanto de la Marsejla sekcio, en sia parolado atentigis pri la uzado de Esperanto (ĉe la Esperanto-sekcio de tiu movado) por la internacia disvastigo de la Movado de Abundo. Tio multe influis la aŭdantaron. Post la kunveno multaj personoj kontaktiĝis kun la ĉeestantaj esperantistoj kaj petis la starigon de Esperanto-kursoj. Fine de oktobro ni malfermos kurson por la membroj de la Movado Franca de Abundo.

E.E. YELLAND.

Nia rilato al germanaj esperantistoj.

La artikolo de la juda-pola esperantisto en n-ro 5 elvokis protestojn de diversaj flankoj. Tion ni ja atendis. La unua protesto atingis nin el Belgujo, la dua el Nederlando, la tria de angla samideano, kaj poste sekvis ankoraŭ aliaj, inter ili unu el Finnlando, kun multaj subskriboj. Eĉ juda samideano, rifuĝinta al Britujo, skribis al ni ke, kvankam li samopinias pri la tuta afero kiel la skribinto de la artikolo, tamen li ne aprobas la lastan frazon, malgraŭ tio ke, pro la Hitler-teroro, li perdis sian tutan familion.

« Ĉu ni esperantistoj », li skribas, « imitu la aĉajn metodojn de Hitler per ekskludo de parto de la esperantistaro el Esperantujo ? *Esperantujo devas esti la estonta interfratigita homaro,* kaj en tio ĉi konsistas la plej gravaj meritoj de nia movado. »

Amare esprimis sin unu aŭstra esperantisto, ĉeflerneja direktoro, fidela samideano jam de multaj jaroj antaŭ la milito :

« Hieraŭ mi legis en angla gazeto, ke oni elspezis ĝis nun en Usono 12 milionojn da dolaroj por nova veneno, de kiu sufiĉas unco por mortigi la enloĝantojn de Usono kaj Kanado. Kial ne uzi ĝin por mortigi ĉiujn germanajn kaj aŭstriajn homojn ? Mi persone jam ofte enviis la mortintojn kaj estus feliĉa, se oni per rapida morto liberigus min de ĉiuj novaj seniluziiĝoj. Kaj al la verkinto de la artikolo mi deziras, ke li neniam trovu en sia familio anojn, pri kiuj li devus honti. — F.W.V. »

Belga samideano, subskribinte per Jeva, komencas sian leteron jene : « Kun intereso mi legis la artikolon de juda-pola esperantisto. Mi povas imagi (io alia ol travivi) ke li suferis, vidis, aŭdis kaj legis multe pri la koncentrejoj en la diversaj landoj estritaj de la germanoj. Ankaŭ ke li estas malamika kontraŭ ĉiu germano kaj aŭstriano, mi komprenas bone. Tuj mi akordiĝas kaj malaprobas tiajn faraĵojn, sed kion ni devas atendi de militado ? » Li daŭrigas, precipe traktante pri la sensenceco de milito. « Estas nekompreneble ke, kiam oni ordonas al la homoj militiri, ili ne kune protestas, anstataŭ tuj esti pretaj buĉi sin reciproke (ho ŝafaro !)... Se mi bone memoras, D-ro Zamenhof eltrovis helplingvon ne el malamika sento sed por kuniĝo kaj reciproka kompreniĝo.»

Nederlanda laboristo, s-ro E.v.W. en A., skribas ke la artikolo « malĝojigis multajn el la veraj esperantistoj ». « Mi tre bone povas kompreni ke estas homoj, kiuj ne plu volas havi kontakton kun la germanoj, precipe la judoj, ĉar la kruelaĵoj faritaj de la nazi-reĝimo estas diablegaj ; ne estas imageble ke homo povas fari tiajn agojn al alia homo, sed mi certe opinias, *se oni semas malamon, oni ankaŭ nur rikoltas malamon...* Mi malamas la nazi-reĝimon sed feliĉe ne la germanojn. Ĉiuj aferoj, kiujn la juda-pola esperantisto menciis, estas nekontraŭdireblaj, sed se inter la germanoj troviĝas fidelaj esperantistoj, nia organizo devos tute malfermi la pordojn, por ke ili eniru. ‚Anoj de la murdista familio ne povas esti niaj samideanoj', estas la lasta frazo ; jes, ni ne bezonas murdistojn, ni bezonas fidelajn reformistojn, precipe inter la germanoj kaj aŭstroj. La plej nobla homo, kiu iam vivis sur nia planedo, nome Jezuo Kristo, pardonis al murdisto liajn pekojn ; ĉu ne ankaŭ ni devus pardoni al la fidelaj esperantistoj iliajn eblajn malgrandajn pekojn dum la nazi-teroro ? Ĉu ni ĉiuj estas tute sen pekoj ? Feliĉe en diversaj gazetoj oni povas legi pri interkompreno pri Germanujo, kaj ĝi urĝe necesas, ĉar *Germanujo ankaŭ devas kunlabori por pli bona situacio en Eŭropo.* »

« Estas ja simpla mensogo », skribas alia nederlanda samideano, s-ro W.M. en V., « ke ĉiuj germanoj estas kulpaj pri la okazintaĵoj, kaj kial ni devas nun turni la dorson al miloj da germanaj samideanoj, kies sola ‚kulpo' estas, ke ili naskiĝis kiel germanoj ? *Ĉu ni do agu laŭ la Hitlera metodo ?* Ankaŭ li kaj liaj kunkulpuloj kondamnis tutan popolon (la judan) pro miskonduto de unuopuloj. Alia afero estus, se la verkinto estus postulinta, ke oni malakceptu en la movado iamajn partianojn, kvankam eĉ tiam mi ne laŭdus lian proponon. Cetere neniu devigas la verkinton havi personajn rilatojn kun germanoj, kaj same la verkinto ne havas la rajton postuli de aliaj ke ili nepre bojkotu ĉiujn germanojn. Laŭ juda konvinko (kiun mi respektas) la postulo povas esti prava, laŭ kristana ĝi estas maljusta. Kaj krome : kie estus la fino ? La judoj (kaj certe ne nur ili) malŝatas la germanojn, aliaj (ne mi) evitas la judojn ; se la gazetoj raportas la veron, ekzistas por multaj gravaj kialoj por malestimi la rusojn, same la grekoj kaj abisenoj certe ne ŝatas italojn, ktp. ktp. Ĉu ‚la bela sonĝo de l' homaro' iam efektiviĝos, se eĉ en la Esperanto-movado (esence *lingva* afero) ni enkondukos naciajn mezurilojn ? »

Je la fino sekvu la voĉoj de nederlandano, kies edzino antaŭ nelonge vizitis la familion de dana delegito, pri kiu li skribas en sia letero, — kaj artikoleto de nia angla amiko Sturmer.

Ĉu li apartenis al la « murdista familio » ?

Jen estas malgranda epizodo el la lasta mondmilito :

Kiam Danujo estis okupita de germanoj, la familio de la delegito en unu dana urbo okaze konatiĝis kun germana soldato-esperantisto. Li vizitis ilin du-trifoje, kaj poste la vizitoj, malgraŭ severaj malpermesoj de la germanaj aŭtoritatoj, plioftiĝis pro reciproka simpatio kaj amikiĝo. Tiu soldato estis telefonteknikisto. Kaj kion li faris ? Li konstruis sekretan telefonan interligilon en la domo de siaj danaj amikoj kun ĉefa Germana Stabejo tiel, ke ili ĉiumomente povis aŭskulti, kio estis priparolata en la Stabejo. Dank' al tia ago multaj homoj estis avertataj, kiam ilin minacis danĝero, kaj precipe pluraj judaj familioj povis ĝustatempe fuĝi en Svedujon.

Nun naskiĝas la demando, *ĉu tiu kuraĝa soldato,* kiu riskis propran vivon por savi siajn « malamikojn », *apartenis al la murdista familio ?* Jen estas problemo por multaj samideanoj, kiuj ne volas kredi en lojalecon de *veraj esperantistoj,* se ili eĉ apartenu al aŭstra, germana aŭ ia ajn alia gento.

D.ST.

Ni kaj la germanoj.

Nek porgermanulo, nek pacifisto mi estas, sed angla metiisto, kiu pere de Esperanto, en la jaroj inter la du mondmilitoj, renkontis simpatiajn homojn en multaj eŭropaj landoj, ankaŭ en Germanujo.

Dum tridek jaroj en malgrandaj metiejoj, mi lernis multon, ankaŭ tion, ke en ĉiu homo troviĝas kune la dio kaj la diablo. Ĉu oni volas kredigi nin, ke la tuta germana popolo respondecas pro la frenezdiablaj agadoj de la Hitleranoj ? Se jes, oni devus aljuĝi respondecon ankaŭ al la anoj de la potencaj kaj bonhavaj ŝtatoj.

Mi memoras, iam mi estis estro de malgranda metiejo, kie la anoj laŭrange dividis la laboron kaj poste la profiton. Kaj ofte mi pensas pri la bubo, kiu venis kiel metilernanto. Li impresis min parte tre malagrable. Li estis aplombaĉa, fanfaronema, tiranema uleto. Sed lian eksterordinaran kapablon mi devis tuj konscii, kaj post mallonga tempo oni altigis lian rangon, kaj sekve lian profiton. La rezulto estis, ke li montriĝis ege pli simpatia, malpli tiranema por siaj subuloj ; entute, ricevinte iom da sunlumo, li montris pli helan flankon de sia karaktero.

Post la komenco de la nuna jarcento, Germanujo montris sin nacio de eksterordinara kapablo. Sed aliaj potencaj nacioj rifuzis al ĝi rangon kaj profiton. Do, por la krimoj, kiujn listigas juda-pola esperantisto en Heroldo, oni *ne* kulpigu *nur* la germanan popolon. Tio estus kulpigo nek laŭkristanisma, nek vera.

K.R.C. STURMER.

****

Nun aŭ neniam : Amikoj, al laboro !

****

G. B. Shaw

Antaŭ nelonge la konata verkisto *Georgo Bernardo Shaw* festis la 90-an datrevenon de sia naskiĝo. Jen artikolo pri la mondfama maljunulo, de nia kunlaboranto *D-ro A. Mildwurf* en Londono :

G. B. Shaw estas la plej granda vivanta verkisto de la mondo. Li estas ankaŭ « ŝercemulo n-ro 1 » kaj ĉio eldirita de li kaŭzas la deziratan ridon. Liaj ŝercoj estas tre originalaj. « Mia maniero de ŝercado », li asertis iam, « estas diro de la vero. Tio estas la plej amuza ŝerco en la mondo. »

Neniu de post la reĝino Victoria atingis tiun aĝon kun tiom da brillumo ĉirkaŭanta lin, kaj estas limo, kiom la homa okulo povas toleri. Kiam antaŭ jaroj li skribis en « Kiu estas tiu », ke lia ĉefa refreŝiĝo estas « montriĝi en favora lumo », li verŝajne opiniis tiel, sed estas k r e a d o kio plenigis lian ĉefan tempon.

Ĉiuj eldiroj de Shaw estas ie ajn notitaj, kutime en la publikaj presaĵoj. Neniu homo vivanta aŭ morta estis tiel fervore citita kiel li ; neniu publika karaktero estis tiel persiste fekunda kiel li por gazeta « kopio » dum la lastaj kvardek jaroj.

Kiam brodkasto (radio-disaŭdigo) en Anglujo estis rajtigita de la registaro, la kondiĉoj de procedo ekskludis ĉiujn « disputajn » aferojn. Ĉi tiu edikto ne estis direktita kontraŭ iu ajn speciale, sed ĝi aŭtomate ekskludis viron kiel Shaw, kiu ĉiam rifuzis prezenti ion, kion li volis diri, al la kontrolo de iu ajn homo sur la tero. Imagu do la konsternon de l'oficialuloj de B.B.C. (Brita Brodkasta Korporacio), kiam ili malkovris, ke ĉe la publika debato pri « La danĝero de la senokupa virino » inter s-ino Rhondda kaj G. K. Chesterton, Shaw devis esti arbitracianto, kaj ke anstataŭ limigi siajn rimarkojn al nura enkonduko kaj resumo, ĉi tiu arbitracianto ekprenis la okazon por eksplodigi parolbombon ! Kiel oni povis atendi, li eluzis la situacion kun diabla bonhumoro.

« Gesinjoroj, » li diris (laŭ la laŭvorta raporto), « mi devas peti vin konduti speciale bone hodiaŭ vespere, ĉar kio okazas nun, ne estas nur parolado de s-ro Bernardo Shaw al multnombra kaj tro frue entuziasma aŭdantaro en la *Kingsway*-halo. Estas Londono, kiu vokas la britajn insulojn kaj la Universon ĝenerale... Ni estas „brodkastataj", kaj la kondiĉoj, sub kiuj brodkasto estas kondukata en ĉi tiu lando, estas ke nenio de disputa naturo devas esti parolata de la platformo aŭ de ie alie, esceptinte membrojn de la registaro. (Rido kaj aplaŭdoj.) Kiel povas esti kondukata vigla kaj eble incita disputo, se neniu el la parolantoj estiĝas disputema, mi ne povas diri al vi. Mi bedaŭras diri, ke en ĉi tiu rilato mi ne povas entrepreni ion por konservi ordon, ĉar unu el la kondiĉoj de brodkasto en ĉi tiu lando estas, ke al mi mem, persone kaj individue, ne estas permesite brodkasti sub kiuj ajn kondiĉoj. Tiel mia tasko estas iamaniere malfacila. Mia devo kiel prezidanto devigas min sub ĉiuj danĝeroj gardi la rajton de la parolantoj, esti tiel disputemaj kiel plaĉas al ili pri kiu ajn temo, spite al ĉiuj poŝtestroj kaj registaroj en la mondo. (Rido). Ĉi tiun devon mi plenumos. »

« Sed nun observu, kien tio kondukos nin ! Eble en ĉi tiu momento la Ĝenerala Poŝtestro aŭskultas. Li imagas ke mi estas parolanta. Lia paniko verŝajne kreskas kun ĉiu frazo, kiu falas de miaj lipoj. Kiamaniere haltigi min ?... Mi ne scias ; sed evidentiĝas al mi, ke la Ĝenerala Poŝtestro povas voki la gardistaron. Se vi do konstatos, ke energia taĉmento da soldatoj kaj policistoj invadas ĉi tiun halon, detruante la mikrofonon kaj arestante min, mi petas vin : ne rezistu ! (Rido.) Via foriga rimedo estas konstitucia. *Vi devas voĉdoni konstraŭ la Registaro dum la venonta elektado.*» (Rido kaj aplaŭdoj.)

« Nun iuj el vi povas respondi, ke tio ne estas foriga rimedo por vi, ĉar vi jam intencas voĉdoni kontraŭ la Registaro. Bone, vi havas unu plian forigan rimedon ; mi kredas, ke ĝi estas strikte konstitucia. Mi parolas nun ne nur al vi, gesinjoroj, kunvenintaj en ĉi tiu halo, sed al la resto de la ok milionoj da aŭskultantoj. Mi sugestas al vi, ke, se ĉiu el vi skribus al la Ĝenerala Poŝtestro, dirante al li, kion vi pensas pri li, vi estos strikte interne de la literoj de la leĝo, vi kontribuos enorman sumon en poŝtmarkoj al enspezoj, kaj vi absolute certiĝos, ke neniu Ĝenerala Poŝtestro iam denove provos interveni ĉe la libereco de parolo en Anglujo.» (Longaj aplaudoj.)

Tio do estis la unua brodkasto de Shaw. Kio okazis malantaŭ la kulisoj inter la registaro kaj la B.B.C., koncernas neniun, ĉar sendube centoj, eble miloj, sekvis la konsilon de Shaw kaj skribis al la Ĝenerala Poŝtestro. Unu aŭ du jarojn poste lia antaŭdiro pri libera parolo efektiviĝis : disputo estis permesita en la brita aero.

Li estas peniga viro por intervjuado, la plej neperceptebla celtabulo por « leonĉasisto », la viro plej malfacile gajnebla por la kutima speco de « bona afero ». Oni ne povas logi lin per flataĵoj, kiom ajn subtilaj ; lia ruza okulo malkovrus la celon kaj devigus vin veni al la kerno de la afero. Kaj kiam li foje decidiĝis, estas maleble flankenigi lin de lia decido.

En Londono estis aranĝita granda festmanĝo je honoro de *Prof Einstein,* por subteno al suferantaj judoj en la Proksima Oriento. Shaw estis persvadita paroli tie.

Tosti la plej faman judon de la mondo estis « ĝusta pasteĉo » por Shaw. Sidante apud la ĉefrabeno de Londono, la blonda, bluokula, blankbarba irlanda liberpensulo vestis sin per nigra kranioĉapo pro respekto al la ortodoksaj judoj, kiuj multnombre partoprenis kaj kiuj turniĝis orienten, kiam oni ekkantis la preĝojn. Poste kun sia karakteriza « cinikeco» Shaw komencis per tio, ke li metis Izakon Newton en lian lokon.

« Faktoj », li diris, « neniam ĝenas anglon. Tiel Newton „ eltrovis " la rektan linion kaj gravitadon kaj Newton'an Universon, kiu daŭris, ĝis kiam juna viro rigardis je tio kaj diris : ‚Newton ne sciis, kio okazis al la pomo, kaj mi povas pruvi tion, kiam alvenos la proksima ekliptiko. La ĉielaj korpoj iras en kurblinioj, ĉar tio estas por ili la natura vojo iri. Kaj tiel la tuta Newton'a Universo kuntiriĝis kaj estis sekvita de la Universo de Einstein. »

(Finota.)

Svend Dragsted kaj la Gestapo

(Daŭrigo.)

Mi ne scias, kio okazis, kiam kaptitoj helpis min eniĝi en aŭtomobilon, kiu veturigis min al « Vestre ». Tie aliaj kaptitoj helpis min en mian ĉelon. Dum kelkaj tagnoktoj mi kuŝadis surventre, ne dormante, ne farante ion, nur ĝemante.

Estas neeble por aliaj tute kompreni la bestecon kaj kruelecon de tiu torturo. *Mi* spertis la « ĉarmegan » nacisocialismon.

Miaj ĉelkamaradoj flegis min kiel eble plej bone. Ĉie sur la korpo mi havis ruĝajn kaj bluajn striojn, estis ja preskaŭ la anglaj koloroj.

Ni estis en nia ĉelo tri personoj. Unu el miaj ĉelkamaradoj estis SS-ano, kaj li estis batalinta ĉe la orienta fronto dum du aŭ tri jaroj. Fakte estis treege malagrable, ke li troviĝis en la sama ĉelo, oni ja ne kuraĝis diskuti ion. La alia estis dana policisto. Li havis dolorigan sorton. En Froslev mi sciiĝis, ke la germanoj ekzekutis lin. Estis tre malgaje por mi ricevi tiun sciigon pri lia morto. Li estis nobla kaj tre honesta homo, kiun mi multe admiris.

Iun nokton okazis io mistera. Mi vekiĝis, kiam iu el miaj ĉelkamaradoj min skuis kriante : « Dragsted, Dragsted, vekiĝu! Ĵus iu kriis en germana lingvo : *Achtung, Achtung,* post kvin minutoj la malliberejo estos eksplodigata ! » Tio tuj vekis min. Mi aŭskultis, kio estas. En la koridoroj de la konstruaĵo la germanoj kuris rapidege. Post unu minuto ne troviĝis iu germana gardisto en la malliberejo. Mia ĉelkamarado ne estis sonĝinta.

Sekvis teruraj minutoj. Se oni eksplodigus bombon en la domo, ni povus nenion fari. Ni ja troviĝis en ŝlosita ĉelo. Ni atendis : kvin minutojn, dek minutojn, kvaronhoron. Nenio okazis. Post duonhoro la germanaj gardistoj ree envenis en la malliberejon.

Poste mi sciiĝis, kio vere okazis. Temis pri veto. Iu arestito vetis kun siaj ĉelkamaradoj pri tio, ke li povos en kvin minutoj malplenigi la malliberejon je germanoj. Li tial grimpis al la ĉelfenestreto, singarde malfermis ĝin kaj kriis al la germana gardisto, deĵoranta sub ĝi sur la strato, ke oni eksplodigos la malliberejon post kvin minutoj. La gardisto ne sciis, kiu estis la krianto, kaj tial li alarmis la gardistaron, kiu tuj forlasis la domon.

Nu, mi ja ne restis eterne en « Vestre ». Iun vesperon komence de marto la ŝlosilo rulbruis en la seruro, kaj la gardisto ordonis, ke mi estu preta por esti fortransportata post dudek minutoj. Oni ne rakontis al mi kien, ĉu al Germanujo, ĉu al Froslev. Feliĉe, estis al *Froslev.*

La transporto al Froslev daŭris kvardek horojn. En la stacidomo por komercaĵoj en Kopenhago oni metis nin en ŝlositajn vagonojn, kutime uzatajn por transporto de brutoj. La vagono estis ok metrojn longa kaj tri metrojn larĝa, kaj en tia vagono ni estis kvindek personoj, kune kun niaj kofroj kaj pakaĵoj, kiuj ankaŭ okupis grandan spacon. Ĉiu homo do meznombre havis duonan kvadratmetron por si mem kaj siaj pakaĵoj. Ni ne povis ĉiuj samtempe sidi sur la planko de la vagono ; kelkaj devis ĉiam stari. Kompreneble ni povis nur malmulte dormi ; mi supozas, ke dum la tuta vojaĝo mi dormis nur unu horon. Krom tio oni devas pripensi, ke ni ekvojaĝis malfrue vespere, ni do kompreneble ne estis dormintaj dum tiu tago, kaj ke ni alvenis en Froslev matene kaj ne povis dormi en tiu tago, antaŭ ol fariĝis vespero. Do entute mi nur dormis unu horon en la daŭro de sepdek horoj. Vi certe povos kompreni mian lacecon.

Ĉe la envagoniĝo ni ĉiuj ricevis malgrandan pecon da nigra pano (supozeble 500 gramojn), iomete da butero enpakita en papero kaj malgrandan pecon da fromaĝo. Mi ŝovis la panon en iun el miaj surtutpoŝoj, kaj la buteron kaj fromaĝon en alian. Sed kiam, en la daŭro de la vojaĝo, mi deziris manĝi iomete, unue mi preskaŭ ne povis movi miajn brakojn, preskaŭ estis neeble meti la manojn en la poŝojn ; sed kiam mi post iom da tempo sukcesis en tio, mi due eltrovis, ke mia butero estis tute frakasita. Ĉie en la poŝo troviĝis butero, kaj kiam mi elprenis la manon, butero estis ĉirkaŭ ĉiu fingro.

En la vagono ne troviĝis necesejo ; ni devis fari niajn necesaĵojn en angulo de la veturilo. Tio ja ne plibonigis la higienajn cirkonstancojn.

En la vagono ankaŭ estis malsanuloj, ekzemple iu havis ftizon, tuberkulozon en la pulmoj. Li dum la tuta transporto kraĉis sangon. Estis miraklo, ke neniu el la ceteraj infektiĝis.

Ni alvenis en Froslev la 9-an de marto antaŭtagmeze. En « Vestre » ni estis aŭdintaj iomete pri la relative bonaj cirkonstancoj en la kaptitejo de Froslev, sed kompreneble ni ĉiuj estis scivolaj, ĉu tiuj rakontoj estis veraj. Kaj ili estis veraj !

Komence oni ŝlosis nin en malgrandan barakon, kie ni devis atendi kelkajn horojn. Poste oni kondukis nin al la barako kiu servis kiel manĝejo. Tie la kuireja helpantaro pretigis treege bonan varman manĝaĵon por ni. Ili ja sciis, ke ni ricevis nur malmulte da manĝaĵo en la malliberejo « Vestre ». La varma manĝaĵo estis rostita hepato. Ni preskaŭ ne estis vidintaj viandon dum unu monato, sed nun ni povis manĝi tiom, kiom ni deziris. La kuirejaj helpantoj trenis grandajn pelvojn kun hepato en la manĝejon. « Ĉu vi deziras ankoraŭ pli multe da hepato ? » ili demandis. Ho, ni ĉiuj manĝis kvin grandajn pecojn da hepato aŭ pli, kaj ni ankoraŭ plenigis niajn poŝojn per hepato.

En Froslev ni kutime ricevis bonan kaj sufiĉan manĝaĵon ; sed nur la novalvenintoj ricevis tiun abundon, pri kiu mi ĵus rakontis.

La kaptitejon de Froslev oni konstruis laŭ instigo de la dana registaro, por eviti ke la danaj kaptitoj estu transportataj al Germanujo. Tamen vi ĉiuj supozeble scias, ke la germanoj rompis la promeson donitan al la dana registaro kaj ke ili grandskale sendis danajn ŝtatanojn al koncentrejoj en Germanujo.

La kaptitejo de Froslev estis konstruita por mil ducent kaptitoj. Kiam mi alvenis en la komenco de marto, jam troviĝis tie du mil personoj. Sed konstante alvenis novaj kaptitoj, parte el diversaj danaj malliberejoj, parte de la koncentrejoj en Germanujo. Kiam la danaj policistoj alvenis el la germana koncentrejo Neuengamme, ni estis pli ol sesmil personoj en la kaptitejo.

Oni do povas kompreni, ke ne estis multe da spaco por ni. Ne troviĝis lito por ĉiu kaptito. Kelkaj dormis sur matracoj sur la planko, aliaj dormis en ĉambroj, kie troviĝis nur pajlo aŭ fojno. Se kelkaj kuŝis sur la litoj, por la ceteraj apenaŭ estis loko por sidi aŭ stari.

La unuan tagon en Froslev mi renkontis plurajn konatojn. Iu el ili igis min transloĝiĝi al tiu ĉambro, kie li loĝis. Mi baldaŭ sciiĝis, kial li tiel fervore deziris mian ĉeestadon en tiu ĉambro.

La ĉambro havis sekreton, kaj eĉ gravan sekreton.

(Finota.)

****

Aŭtuno.

Mi ŝatas la aŭtunon peze silentantan
kun ĝia nebularo pala. La senkantan
krepuskon bluan enarbaran. Ĉiuj floroj
kliniĝas lace, velkaj, — staras sen odoroj.
Trankvilo malrapide trans la kampojn
la sunon grizaj nuboj envieme kaŝas [paŝas,
Nenio plu kolore aŭ per voĉ' rivalas,
de l' arboj nur la foliaro flava falas.
Kaj tra la kor' jen eksopiro pasas vee,
kelkiu vund', jam cikatrita, sangas ree,
kaj morta jam deziro iĝas reardanto, —
jen la malnova, ho eterne nova kanto !

L. KRYSTA.

RIDO SANIGAS

ESPERANTISTO AL ALIA.

— Vi ĵus revenis el Hindujo ? Diru do al mi, ĉu hindoj preferas briton aŭ japanon ?

— Demandu hindon mem ! Li certe respondos : *Ja, panon !*

LA NEVO.

Elizo (neatendite vizitante sian amikinon) : Ho, mi ja ne ĝenas ?

Anjo (surprizite) : Eh ... jes ne ! Ĉu mi prezentu : mia nevo Karlo.

Elizo : Ho, nebezone. Pasintjare li estis *mia* nevo.

Libroj livereblaj el nia provizo

Abdul Baha (Lidja Zamenhof): *Parizaj paroladoj* 1.20
Adolf : *Decismo.* Politika broŝuro 0.30
Albanio 0,15
Baghy : *Printempo en la aŭtuno.* Rakonto . . . 1.20
Barker : *La lingvo de la bestoj* 0.15
Blicher (Bulthuis) : *Taglibro de vilaĝpedelo.* Rakonto 0,15
Bukedo I. Rakontoj de diversnaciaj aŭtoroj . . 0.30
Bukedo II. Rakontoj de diversnaciaj aŭtoroj . . 0.30
Bulthuis : *Malriĉa en la spirito.* Drameto 0.30
* Cunningham (Newell kaj Sturmer): *La hantataj ŝipoj.* Rakontoj 0.30
* Elola (Berenguer): *La amo en la jaro dekmil.* Romano 1.95
La sama, bindita 2.85
Esslemont (Lidja Zamenhof) : *Baha-u'llah kaj la Nova Epoko* 1.80
* Fock (Jarszewski) : *Navigado estas necesa.* Rakontoj 0.30
Haefker : *Jarmiloj pasas.* Originala mondhistorio, bindita 7.50
Herceg : *Pangea.* Politika broŝuro 0.15
Hesse : *Sonoj novaj kaj malnovaj.* Versaĵoj . . . 0.15
Hohlov : *La tajdo.* Lirikaj versaĵoj 0.60
* Isac (Morariu) : Sonorilo kaj kanono 0.60
Jung : *Ek al batal' !* Esperantistaj versaĵoj . . 0.15
* Jung : *La alta kanto de la amo* 0.30
Jung : *Landoj de l' Fantazio.* Originala romano . . 2.70
* Kalidasa (Jung): *Sakuntala.* Rakonto laŭ dramo 0.30
Kilian : *La mondon al ni !* Vojaĝaventuroj . . . 0.90
Kloepffer (Goppel) : *Vagabondo kaj sinjorino.* Romano, bindita 2.85
La Maro. Rakontoj, bindita 2.10
La Multekolora Libro. Varia legaĵo 1.20
La senkorpa mistero 0.15
Maxwell (Sampson) : *Anstataŭa edzino.* Romano, bindita 2.85
* Meye : *La longa vojo.* Originala romano . . . 1.65
Minor : *Pro Dio, ne esperantiston !* Unuaktaĵo . 0.15
* *Oriento.* Orientaj literaturaĵoj, bindita 2.10
Patroj. El antikva hebrea literaturo 0.30
Robinson : *Se grenereto.* Originalaj rakontoj . . 1.05
La sama, bindita 1.50
Scott : Filatela terminaro 0.30
Storm (Heitmüller) : *Du majstronoveloj.* Bindita 2.10
Sub la signo de l' Espero. Rakontoj el la esperantista vivo 0.30
Ŝalom-Alejĥem : *Ĉe doktoro* 0.15
Tolstoj (Hohlov) : *La morto de Danton.* Tragedio 0.60
Trögel (Schröder) : *Esperanto kaj kulturo* . . . 0.30
* Wiesenfeld : *Galerio de Zamenhofoj* 0.60
Wingen : *Kiel aranĝi kursojn kaj grupversperojn?* 0.15
Zweig (Wolff) : *La okuloj de la eterna frato* . . 0.90

* Steleto signifas ke la koncerna verko estas elĉerpiĝanta.

La prezoj estas en guldenoj. Por sendkostoj aldonu 10 %, en Nederlando 5 %. Ĉe mendo por minimume 10.— guldenoj (Nederlando 5.— gld.) ni liveras, ne kalkulante sendkostojn. Ekster Nederlando estas rekomendinde mendi niajn librojn ĉe sialanda Esperanto-libroservo.

Libro-Servo de HEROLDO DE ESPERANTO, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando

HEROLDO en 1947.

Normo por la abonkotizoj de Heroldo restas la MA-kotizoj de IEL, por 9-monata abonjaro.

Abonantoj ricevos minimume 50 % pli multe da numeroj ol en 1946.

Jam alproksimiĝas la vintra sezono. Kaj kun tio prezentiĝas la neceso, decidi pri la abonkotizoj por la nova jaro. Sed fiksi la novajn abonkotizojn por 1947, kiam Heroldo jam regule aperos duonmonate, estis problemo, pri kies konvena solvo ni rompis nian kapon dum pli ol du monatoj. Tiu ĉi problemo havas ja diversajn flankojn kaj aspektojn. Unuflanke preskaŭ triobliĝis la preskostoj (laŭ belgaj frankoj) ; aliflanke ankoraŭ ne kreskis la salajroj de la pli multaj samideanoj kaj samideaninoj sammezure kiel la vivkostoj. Unuflanke ni bezonas certan prezon, por povi ekzistadi kun la duonmonata organo ; aliflanke multaj samideanoj povas elspezi por la abono nur difinitan sumon.

Unuflanke ni deziras fiksi tutjaran kotizon, kaj eviti partopagojn aŭ postpagojn, kiuj ĉiam estas malagrablaj kaj ankaŭ kaŭzas apartajn laborojn kaj klopodojn ; aliflanke multaj samideanoj ne povas elspezi grandan sumon en unu fojo. Al tio venas la malfacileco, ricevi la pagojn al la eldonejo en Belgujo ; el kelkaj landoj tio tute ne estas ebla. Krome, pro la fakto, ke en multaj landoj la IEL-ĉefdelegitoj bonvole akceptas abonkotizojn por Heroldo, estas rekomendinde, fiksi abonkotizojn por Heroldo konformaj al la MA-kotizoj de IEL.

Kredu al ni, ke ni ja konsideris kaj rekonsideradis la problemon el ĉiuj flankoj. Ni interkonsiliĝis pri ĝi kun diversaj amikoj, ni korespondis pri ĝi kun IEL, ktp. La definitiva decido povis nur esti kompromiso kiu, tamen, ŝajnas al ni en la nunaj cirkonstancoj la plej taŭga solvo trovebla. Jen la rezulto :

En 1946 aperis (aŭ - os) entute 10 numeroj de Heroldo, kontraŭ norma abonkotizo, kiu konformas al la MA-kotizo de IEL (t.e. 10 anglaj ŝilingoj, 2 usonaj dolaroj, 5 ned. guldenoj ktp.). *Ni decidis, ankaŭ por la venonta abonjaro (1947) apliki kiel norman abonkotizon la MA kotizon de IEL.* .Tiu (nova) MA-kotizo estas por kelkaj landoj iom pli alta ol la ĝisnuna (nome 2.50 dolaroj, 5.50 guldenoj ktp.), sed oni povas supozi, ke en la daŭro de la kuranta jaro la salajroj jam iom plialtiĝis, kaj ke sekve la pago de la nova kotizo nuntempe prezentas ne pli grandan streĉon, ol kiun prezentis la pago de la malnova kotizo antaŭ unu jaro.

Sed — ankaŭ tiu iom plialtigita kotizo ne sufiĉas por duonmonata Heroldo dum tuta jaro. Tial *ni decidis, ke la abonjaro 1947 daŭru nur 9 monatojn.* (La pli posta abonjaro daŭros eventuale de oktobro 1947 ĝis septembro 1948. Tiu aranĝo havus la avantaĝon, ke estonte la samideanoj ne bezonus pagi ĉiujn kotizojn — por IEL, landa aŭ faka organizo, Heroldo ktp. — en la komenco de la jaro). Krome, ni decidis, ke dum la libertempaj monatoj eventuale devos sufiĉi unu numero monate.

Do, por abonkotizo, egala al la MA-kotizo de IEL por 1946, ni liveris 10 numerojn; *por la abonkotizo, egala al la MA-kotizo por 1947, ni liveros minimume 15 numerojn.* Sed se ĝis la fino de majo ni konstatus tiom grandan kreskon de nia abonantaro, kiom ni en la nuna momento ankoraŭ ne kuraĝas esperi, ni povos eventuale decidi poste, ke por la sama abonkotizo ni liveros Heroldon dum la tuta jaro, t.e. ĝis la jarfino 1947.

Do, gesamideanoj, estas en via mano, havi duonmonatan (kaj pli poste semajnan) gazeton por kiel eble plej malalta abonkotizo. Sed ni ne volas promesi pli multe, ol ni certe kapablos plenumi.

Vidu ĉi-sube la Tarifon de Heroldo-kotizoj 1947 por la unuopaj landoj, kaj la adresojn, al kiuj oni povas pagi.

Ni recenzas.

Brazilaj samideanoj estis tre eldonemaj.

Tipoj kaj aspektoj de Brazilo. Originaloj el la Brazila Revuo de Geografio. Speciala presado memoriga de la Deka Brazila Kongreso de Esperanto. — Rio de Janeiro, Presejo de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko, 1945. — 151 p., 18 x 27 cm. — Bona papero, bona preso, 36 tutpaĝaj ilustraĵoj kaj 36 interesegaj ĉapitroj, tradukitaj de la plej spertaj brazilaj esperantistoj. Unu el la plej instruaj libroj ĝis nun aperintaj en Esperanto.

Urbo Salvador. Eldonis Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko en Rio de Janeiro. — 52 p. kaj kovrilo, 20 x 21 cm. — Amaso da ilustraĵoj sur luksa artpresa papero, kun koncizaj klarigoj, pri la brazila urbo Salvador, ĉefurbo de la ŝtato Bahia. Tiu ĉi luksa eldonaĵo montras ke ankaŭ en la Nova Mondo ekzistas urboj kiuj povas konkuri kun eŭropaj metropoloj koncerne tradicion, arton kaj progreson.

Francisko Vladimiro Lorenz : Diverskolora bukedeto. Poemoj kaj poemetoj tradukitaj el 40 lingvoj. — 159 p., 13 x 18,5 cm., bindita. Aperis dum la milito (1941) en Rio de Janeiro, Brazilo, ĉe Livraria Editora da Federação E. Brasileira, Avenida Passos 30.

La bukedo de F. V. Lorenz (buke*deto* estas tro modesta) efektive estas tre diverskolora, ne nur laŭ la nombro de la lingvoj, el kiuj ĝi estas kolektita, sed ankaŭ laŭ la esenco, formo kaj kvalito de la poemoj. Ne estas loko por detale priparoli ilin. Unu el la plej simplaj sed plej ĉarmaj, tradukitan el la ĉeĥa, la gepatra lingvo de Lorenz, la legantoj trovis en la 5-a numero de Heroldo. Mallonge ni diru : Kvankam Lorenz ne estas Kalocsay — tia ekzistas nur unu en Esperantujo — sed lia talento estas rimarkinda, kaj lia diligento admirinda ; krome li estas unu el la veteranoj de nia movado, eldoninte jam en 1890 « plenan lernolibron de la lingvo Esperanto por bohemoj ». Preskaŭ 50 jarojn li vivas en Brazilo.

Allan Kardec : Enkonduko en la studadon de la Spiritisma Doktrino. — 39 pĝ. kaj kovrilo, 14 x 19 cm. Libraria Editora da Federação E. Brasileira, Rio de Janeiro. — Tiu ĉi libreto estas ekstrakto el « La Libro de la Spiritoj », kiun ni recenzis en nia numero 4.

Allan Kardec : Preĝlibro por spiritistoj. El la franca lingvo tradukis I. G. Braga. — 80 p., 9,5 x 16,5 cm. Bindita. Prezo ne montrita. Eldonis Libraria Editora da Federação E. Brasileira, Rio de Janeiro. — Kvankam la spiritoj, laŭ la kredo de l' spiritistoj, ne ordonas ian absolutan formulon de preĝoj, tamen formuloj helpas al personoj, kiuj estas en embaraso por esprimi siajn ideojn. Al ili servas la ĉi-jena preĝlibreto.

Leert Esperanto - vraagt hier inlichtingen ! Afiso 37 x 52 cm, desegnita de Floor Meydam sur alegoria fono. Taŭga por elpendigo en fenestroj. Prezo gld. 0.25 ĉe TJ - Centro en W. Graftdijk, Nederlando.

Aŭstro- kaj regno-germanoj atentu !

Al ĉiuj aŭstro-germanoj, kiuj petis tion, ni liveris la ĝis nun aperintajn numerojn de Heroldo tuj, kiam la poŝto ilin akceptis. Al regno-germanoj, kiuj skribis al ni, ni ekspedos la jam aperintajn numerojn tuj, kiam la poŝto akceptos gazetojn kaj presaĵojn por Germanujo. La abonojn al aŭstro- kaj regno-germanoj ni liveros provizore je kredito, fiĉante ke la ricevantoj pagos sian abonon tuj, kiam ni indikos al ili (verŝajne en Heroldo) adreson aŭ konton, al kiu ili povos pagi resp. en Aŭstrio aŭ Germanujo. La abonprezo por Aŭstrio estas por la kuranta jaro (1946) 10 aŭstraj ŝilingoj, por Germanujo 10 markoj.

PAROLAS LA LEGANTO.

LA « ESTONTA MONDO ».

En Heroldo n-ro 5, s-ro Charles D. Hornig dubas, ne, estas konvinkita pri tio, ke la nura ĝenerala aplikado de Esperanto ne alportos al la mondanaro la tiel sopiregatan pacon. Li pravas. Li esprimas la esperon, ke ĉiu rifuzu militdejoron, por ke estu maleble militi. Sed tia espero estas vana.

Unue, ĉar ekzistos ĉiam iuj, kiuj estas sufiĉe aventuremaj por ĝui la ŝancojn de la milita vivo. Aliaj ĉiam estas inklinaj kredi la oficiale prezentatajn belajn idealojn, kiuj devigos entuziasme militi. Kaj ne forgesu la individuan gravan punon, per kiu la registaroj minacas rifuzontojn. Fidi je ĝenerala rifuzado estas tro naive.

Des malpli, ĉar kutime sekvas milito post tempo de malprospero. Kiam la produktado estas tro granda por la ebleco ĝin vendi. Kiam la laboristaro senlaboriĝas, ĉar la produktado devas esti malgrandigata. Kiam ŝajnas solvo, fabriki militilojn, por ke denove la laboristaro povu produkti. Kiam estas solvo por la senlaboruloj akiri vestojn, ŝuojn, unuvorte : vivrimedojn, per la alprenado de la okazo fariĝi militisto.

Sed nek per ĝenerala enkonduko de Esperanto, nek per espero je ĝenerala rifuzado militdejori ni povos akiri la pacon. —

Ĉi-supre mi aludis ke la produktado dum krizo estas tro granda, por ke oni povu vendi la produktojn. Alimaniere dirate, la produktantoj mem enspezas tro malmulte da mono por povi aĉeti la de ili mem produktitajn varojn. Tio estas la ekonomia streĉo : troa produktado kontraŭ nesufiĉe da enspezata mono por povi aĉeti la produktaĵojn, dum la plimulto de la popolo malprosperadas, la tiel nomita « krizo ». Se oni povus solvi tiun ekonomian streĉon, tiam la kaŭzo de militoj forfalus. Ĉar tiam oni ne bezonus militi por akiri porvendoregionojn alilandajn.

Ĉu ekzistas tia solvo ? Jes ! — La respondon povas doni la *Socia-Kredito-Movado*, kies deveno estas en Anglio, de kie la ideo disvastiĝis tra la mondo. Por ĝi oni ne bezonas fariĝi bonemulo, nek idealisto, sed sana egoisto, sufiĉe klarpensanta por postuli la ekonomie eblan : « Ĉiu akiru sufiĉe da mono por povi aĉeti la efektivan abundon ! » (Adreso de la Socia-Kredito-Movado : F-ino M. Stewart, sekr. S.C.C.C., Gordon House, Carrington Street, Nottingham, Anglio.) Rimarkinde estas, ke la revuo de tiu movado nomiĝas « Abundance » (Abundo).

Ne precize same, sed sur paralela vojo, propagandas la franca movado « *Mouvement Français de l' Abondance* », prezidanto-fondinto Jacques Duboin, 47 Rue de Miromesnil, Paris 8, aŭ 12 Rue Haxo, Marseille (tiu lasta oficejo povas respondi esperantlingve). La revuo de la franca movado ankaŭ nomiĝas « L'Abondance ».

Skribu intormpetante, amase, por ke tiuj movadoj Esperantiĝu, la ekonomiaj kondiĉoj ekstermu la militon, kaj ĉie surmonde efektiviĝu paco kaj prospero.

H.C. MAGEL.

IEL-Ferioklubo.

IEL ellaboris planon por aranĝi libertempojn ĉe gesamideanoj en diversaj landoj. La plano estas publikigita sub la titolo « IEL-Ferioklubo » en la oktobra numero de « Esperanto Internacia ». Jam antaŭ la milito ekzistis similaj aranĝoj, sed ili ne bone sukcesis. La IEL-plano evitas la mankojn de la antaŭaj aranĝoj kaj efektive ŝajnas taŭga kaj sukcespromesa. Interesuloj sin turnu al la oficejo de IEL en Heronsgate, Rickmansworth (Herts), Anglujo.

RIDO SANIGAS

LA POMO.

Instruisto (ĵus pritraktinta la frakciojn): Teofilĉjo, se vi posedus unu pomon kaj vin vizitus tri amikoj, kion vi farus ?

Teofilĉjo : Mi atendus ilian foriron kaj poste formanĝus la pomon.

Esperanta Radio-Kalendaro.

LA EVANGELIO PER ESPERANTO.

« Nederlandsche Christelijke Radio-Vereeniging » (Ned. Kristana Radio-Asocio) prizorgos ĉiun duan monaton Esperanto-elsendon kvaronhoran. La unua elsendo supozeble okazos dum novembro. (Parolado de s-ro H.A. de Hoog, prez. de Kristana Unuiĝo de Ned. Esperantistoj, en la rubriko « La Evangelio per Esperanto ».) Dua elsendo verŝajne okazos vendredon, la 20. 12.1946, je 18.45-19.00 h. GMT (19.45-20.00 h. nederlanda kaj mezeŭropa tempo), per ondo 415 m. Skribu, dankante, al : N.C.R. V., afd. Omroep, Postbus 5, Hilversum, Nederlando. Samideanoj ekster Nederlando skribu en Esperanto.

BELGA NACIA RADIO-INSTITUTO

komencis la 5.10. elsendon de Esperanto-kurso, gvidata de E. Symoens. La kurso okazas ĉiun sabaton je 14.00-14.10 per ondo 202 m. Esperantistoj diverslandaj skribu al B.N.R.O., Rijsselstr. 36, Kortrijk, Belgujo, gratulante la stacion. Nederlandlingvanoj skribu en nederlanda lingvo, aliaj en Esperanto.

Cetere ni ne ricevis novajn informojn koncerne la Esperantan Radio-Kalendaron.

Ekzamenu vin mem !

Respondoj al la demandoj en la pasinta numero.

18. Baghy, Belmont, Grabowski, Izgur.
19. A.V. Thompson, Felikso Zamenhof, Kazimierz Bein, E. Adam, I. Ŝirjaev, L.L. Zamenhof.
20. Ni batas nun la dikegan muron, kiu staras inter la popoloj ; cent batoj restas sen rezultato, sed ni ne perdas la kuraĝon kaj estas kontentaj, kiam la centunua elrompas unu brikon.

Novaj demandoj kaj taskoj.

21. Kiu verkis la jenajn librojn aŭ libretojn ? — Tra Usono kun ruliĝanta hejmo ; Diverskolora bukedeto ; Kompatinda Klem ; Mia spektro ; Viktimoj; Kiki.
22. Kompletigu la vortojn en la jena frazo: Hieraŭ mi vizit— kunvenon, kie parolad— eminenta verkisto. Kiam la kunveno est— fin—, mi est— prezent— al la fama oratoro. Hodiaŭ matene mi renkontis surstrate la saman verkiston, al kiu hieraŭ mi est— prezent—.
23. Kion oni intencis diri ?
    a) Hieraŭ mi vidis viron en aŭtomobilo, kiu estis ebria.
    b) Ĉu vi donis almozon al la maljunulino sur la ponto, kiu frostotremis kaj ploris ?
    c) Kiam la veturilo de la monarko atingis la angulon, bombo estis ĵetata de viro, kiu tuj eksplodis.

ANONCETOJ

Anoncetoj kostas por ĉiuj 20 komencitaj vortoj aŭ mallongigoj kvinonon de la jarabono, aŭ 20 b. fk., aŭ 1.— gld., aŭ 5 resp.-kuponojn ; por trifoja enpreso duobla prezo. — Ni senpage publikigas anoncetojn pri serĉataj personoj kaj pri familiaj aferoj esperantistaj : naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo kaj gravaj jubileoj.

Fabriko de kosmetikaĵoj serĉas kontakton kun Sudameriko (precipe Brazilo, Argentino kaj Urugvajo). Interesuloj sin turnu al U.E.F., 34 rue de Chabrol, *Paris 10,* Francujo.

Salutojn, alilanduloj ! Por montri al nekreduloj ke Esperanto vivas en ĉiu parto de Eŭropo, nia klubo aranĝos korespondvesperon je 28 novembro. Skribu poŝtkarte al Christopher Hawkes, Sidcot School, *Winscombe,* Somerset, Anglujo. — Respondo certa.

Bildkartan vesperon ni aranĝos la 15 decembro. Sendu ĉiajn bildkartojn al : Esperanto-Klubo de Odense, Lisesmindevej 4, *Odense,* Danujo. Respondo garantiata.

Kino-amatoro serĉas korespondantojn por interŝanĝi konsilojn kaj eventuale filmojn. Sin turni al : S-ro Dessoit, 44 rue de Chaligny, *Paris (XII),* Francujo.

29-jara sveda fraŭlo deziras korespondi kun fraŭlinoj en la tuta mondo. Nils Johansson, Postfack 15, *Hälleforsnäs,* Svedujo.

11-jara knabo deziras korespondi kun samaĝaj gejunuloj. Yvo Schneider, 5 rue Port aux Planches, *Nancy,* Francio.

S-ro B. Levy, 2 Marywood Square, *Glasgow,* Skotlando, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per ilustritaj kartoj, kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Certe respondos.

La Internacia Katolika Informejo, sekretario : Fr. M. Monulfus, *Loonopzand,* Nederlando, senpage donas informojn pri la katolika religio al nekatolikoj. (4)

Pensologio. Serio de 12 libretoj pri Pensologio. Celas helpi homojn de ĉiu religia krednuanco. Specimeno senpage. Dekduo kontraŭ kvar respondkuponoj. Hipsley, 17 Abbots Road, *Birmingham 14,* Anglolando. (14)

H. C. Andersen : La Malbona Suvereno. Tradukita en Esperanto sen supersignoj. Sendu al mi unu resp. - kuponon, kaj vi ricevos tiun aktualan legendon. — H. P. Frodelund, Lisesmindevej 4, *Odense,* Danio. (10)

Gesamideanoj de ĉiuj landoj estas petataj skribi leterojn aŭ postkartojn pri diversaj temoj. Respondo certa. — S. A. Klukowski, ĵurnalisto, Box 10, *Stevens Point,* Wis., Usono. (11)

Ni deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn ilustritajn kun la tutmondo. Kvanton por kvanto. — Ŝanĝejo Munk & Olesen, Hjalmarsvej 5, *Charlottenlund,* Danlando. (12)

Tabelo de Heroldo-kotizoj 1947.

Lando	Abonanto	Sub-tenanta Abonanto	Heroldo-Patrono	Anonceto (po 20 vortoj)	Valuto	Oni pagu la kotizon al
Argentino	8	20	80	1.50	pesoj	E. Iglesias Nunez, Dehesa 1860, Buenos Aires
Aŭstralio	10	20	100	2/—	angl. ŝil.	L.E. Pfahl, 64 Brighton Street, Croydon, N.S.W.
Aŭstrio	20	40	200	4.—	aŭ. ŝil.	Ankoraŭ sciigota
Belgujo	100	200	1000	20.—	belg. fk.	Flandra Esperanto-Instituto, P. v. Humbeekstr. 3, Brussel-W. aŭ : Belga Esp.-Instituto, Antwerpen
Brazilo	40	100	400	8.—	kruz.	Brazila Ligo Esp., Praça de Republica 54, Rio de Janeiro
Britujo	10	20	100	2/—	ŝilingoj	Brita Esperantista Asocio, London W. 11
Ĉeĥoslovakio	100	200	1000	20.—	ĉs. kronoj	Esp.-Asocio en Ĉsl. Respubliko, Praha 47
Danujo	10	25	100	2.—	dan. kr.	L. Jakobsen, C. Etlarsvej 14, Aabyhój (pĉk. 541.33)
Egiptujo	10	20	100	2/—	angl. ŝil.	Tadros Megalli, P.B. 450 Cairo
Finnlando	275	600	2750	50.—	f. mk.	J. Vilkki, Somero (pĉk 60253)
Francujo	240	500	2400	50.—	fr. fk.	J. Guillaume, Esp.-Oficejo, 34 rue de Chabrol, Paris 10
Germanujo ...	20	40	200	4.—	g. mk.	Ankoraŭ sciigota
Hispanujo	22	45	220	5.—	pes.	Ankoraŭ sciigota
Hungarujo ...	24	48	240	5.—	for.	Ankoraŭ sciigota
Irlando	10	25	100	2/—	ŝil.	L. O'hUiginn, Sonas, Cnoc na hInneona, Dundroma-Dublin
Islando	10	20	100	2/—	angl. ŝil.	O.S. Magnusson, Bergstadastraeti 30 B, Reykjavik
Italujo	300	900	4500	75.—	liroj	L. Minnaia, Viale Giulio Cesare 223, Roma
Jugoslavio	100	200	1000	20.—	dinaroj	Ernest Kasoviĉ, Gradska ŝtedionica, Zagreb
Maroko	240	500	2400	50.—	fr. fk.	S-ino I. Fink, 3 rue Savorgnan de Brazza, Casablanca
Nederlando ...	5.50	11	55	1.—	guld.	Teo Jung, Scheveningen (poŝtmandate)
Norvegujo ...	10	25	100	2.—	n. kronoj	Norsk Esperanto-Forbund, Boks 942, Oslo
Nov-Zelando ...	10	20	100	2/—	angl. ŝil.	V.J. Leck, 189 Vivian Street, Wellington C. 2
Palestino	500	1000	5000	100.—	mil.	P. Lachowitzky, Kerem Quar, Jerusalem
Polujo	250	400	2500	50.—	zl.	Ankoraŭ sciigota
Portugalujo ...	50	100	500	10.—	esk.	J. de Saldanha Carreira, Av. Grao Vasco 33 r/c., Benfica-Lisboa
Svedujo	9	18	90	2.—	sved. kr.	Förlagsföreningen Esperanto, Boks 19071, Stockholm 19
Svislando	10	20	100	2.—	sv. fk.	Otto Walder, Eigenheim, Romanshorn
Urugvajo	4	9	40	1.—	pesoj	P. Casas, Mercedes 927, Montevideo
Usono	2.50	5	25	0.50	dolaroj	D.E. Parrish, 328 West 46th Street, Los Angeles 37.
Aliaj landoj ...	10	20	100	2/—	angl. ŝil.	Heroldo de Esperanto, Scheveningen, aŭ: Int. Esp.-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo